

FRANCA

LA HOUSSAYE EN BRIE
77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

KATOLIKA ESPERANTISTO

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★
(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto: S-ro R. Cl. COLAS 6, rue de Mézières 75006 PARIS
Sokr: F-ino G. PREUX 55/3 Rés. La Terrasse Rue du 11 nov. 59290 WASQUEHAL
Kasistino: S-ino J. VINCENT B. P. 54 49150 BAUGE
Peranto IKUE: P-ro R. DEGRELLE B. P. 23 54510 TOMBLAINE

C.C.P. Association Catholique Française pour l'Espéranto 2324 93 ROUEN

==== la n°: 6 F. Abono: 23 F (TTC). Kotizo: 7 F. Sumo: 30 F. ====

N.B. La materialon por la bulteno oni sendu al S-ino Vincent nepre
antaŭ la 5-a de februaro, majo, aŭgusto kaj novembro.

==== N° 143 ==== BULLETIN TRIMESTRIEL ==== TRIMONATA BULTENO ====
*** Sankta PIO X-a, preĝu por ni. ***

==== DECEMBRO 1984 ====

BILETO DE LA PREZIDANTO

Est-ce utopique d'espérer que les membres de notre association sont prêts à sortir du silence pour prendre en main, sur le plan local, la progression de ses objectifs?

Malgré nos invitations à l'action dans nos précédents bulletins, nous ne recevons guère d'échos de l'activité des animateurs que devraient être tous nos membres. Il faut que l'exemple des plus actifs soit connu et aide les autres à se mettre à l'oeuvre avec le sentiment qu'ils ne sont pas des isolés. A cette seule condition, une réelle coordination pourra être développée.

Au cours de notre assemblée générale à Blois, certaines réalisations concrètes ont été évoquées. Il y a sans doute d'autres actions qui sont menées; elles ne doivent pas rester secrètes et ponctuelles. Une place préférentielle devrait être réservée dans ce bulletin aux entreprises qui nous seront signalées, aux résultats acquis. Ecrivez-nous, informez-nous brièvement de ce qui se fait par vous, ou autour de vous, pour que notre mouvement vive non seulement dans le présent, mais aussi dans l'avenir.

Nous entendons souvent nos amis nous dire: "Convertissez nos évêques, notre clergé, pénétrez dans les séminaires, intéressez les jeunes, les institutions, les oeuvres!"

Hélas! ces conseillers ne sont pas des réalisateurs, et ce n'est pas le bureau de l'association qui peut entreprendre ce qui est ainsi proposé: il faut qu'ils agissent eux-mêmes.

Mais avant de viser haut, il convient de former une base: c'est en vivant la communication que nous démontrerons la faculté et la richesse du moyen que propose le mouvement espérantiste; c'est en introduisant nos amis, nos proches dans le domaine des amitiés internationales que nous étendrons le mouvement; c'est en constituant une communauté ouverte au sens de l'universel que nous vaincrons les scepticismes.

../...

Dans les milieux affrontés aux problèmes posés par la multiplicité des langues, on doute encore de l'efficacité d'une langue universelle, neutre, essentiellement pratique.

Il appartient aux groupes existants utilisant l'Esperanto dans les buts les plus divers d'en démontrer les qualités, la précision, la valeur culturelle.

Au-dessus des buts matériels, se situent les manifestations diverses de l'intelligence humaine; plus haut encore, l'univers religieux appelle les hommes à s'ouvrir les uns aux autres. Chrétiens, unis par le baptême au Verbe incarné, et par notre profonde aspiration à l'unité, catholiques, par notre vocation à l'universel, nous voulons qu'entre nos frères des divers pays s'établissent des relations imprégnées de l'esprit de l'Évangile, rapprochés par un langage commun au service d'une pensée commune.

R. Cl. COLAS

RESUMO

Al niaj amikoj, samlandaj kaj eksterlandaj, ni lanĉas alvokon por ke multaj iniciatoj okazu, per partopreno ekzemple en la regiona vivo; ni petas ankaŭ komunikaĵojn por nia bulteno, ĉar nia sukceso dependas ĉefe de nia komuna agado.

Oni mezuros la valoron de Esperanto kiel komunikilo kaj kultura rimedo, se evidentiĝas la vivanta praktiko internacia de la lingvo. Ni uzu ĝin, precipe en rilatoj amikaj kaj frataj kun kristanoj, en la evangelia spirito.

SIMPLA PREGO

Sinjoro, dum silentas tiu nova tago
Mi petas de Vi pacon, saĝecon, forton.
Mi volas hodiaŭ rigardi la mondon
Per okuloj tutplenaj je amo,
Stari pacema, komprenema, milda, saĝa
Humila, senpeka kaj bonkora.

Fermu miajn orelojn al kalumnio
Gardu mian buŝon de misintenco.
Restu nur en mia menso
La benantaj pensoj.

Sinjoro, mi konfidas
La pasinteco al Via korfavo
La estantecon al Via amo
La estontecon al Via providenco.

AMEN.

LA ĜARDENOJ EN FLORENCO

La enloĝantoj de Florenco (Italujo) ĉiam ŝatis la terkulturadon kaj la ĝardenojn. La plej fama estas tiu nomata Boboli. Eleonora, edzino de Kosimo I-a de Medici decidis krei luksegan ĝardenon. En 1549 ŝi aĉetis la palacon Pitti kaj petis Niccolon, konatan per la nomo Tribolo, desegni la novan ĝardenon. Tribolo jam desegnis plurajn ĝardenojn. Li aranĝis la lokon tiel, ke la ĝardeno kuŝas sur la deklivo de la monteto. Li starigis amfiteatron kaj lageton. Pli poste, oni aldonis grotajn, fontanojn kaj akvoŝprucojn, laŭ la tiea fantazio.

En alia urboparto oni povas ankaŭ viziti la "giardino dei simplici", la ĝardenon de la medicinaj plantoj. Kreita en 1545, ĝi enhavas proksimume 9000 plantojn, kulturitajn sur la grundo mem aŭ en vitroĉambroj.

Norde de Florenco staras la vilao Castello, en kiu Kosimo I-a retiriĝis en 1571 post 37 jaroj da reĝado. Tribolo aranĝis la ĝardenon laŭ la deziroj de sia mastro kaj starigis fontanojn, grotajn, statuojn.

Je nur 1600 metroj for de Castello, situas la vilao Petraia, aĉetita en 1575 de kardinalo Ferdinando de Medici. La tiea ĝardeno prezentas plurajn terasojn kaj montras fontanon ornamitan de statuo de Venuso vringanta risian hararon. Tiu ĝardeno posedas apartan parton, la tiel nomatan "servatico", kie libere kaj sovaĝe kreskas cipresoj kaj kverkoj.

Nova dumviva membro: 54) F-ino MARTIN (Alpes-Maritimes)

Novaj membroj 1984: 11) F-ino GIZARD (Gironde); 12) S-ro HARDY (Vienne)

LINGVA ANGULO

Malgraŭ ripetitaj alvokoj, venis nur 3 respondoj al la esprimoj proponitaj en la n^o 142. Pro evidenta manko da intereso, per ĉi tiu rezulto finiĝas la "Lingva Angulo". Dankon al la fidelaj kunlaborintoj.

Jen la tradukoj de G-roj DAUCHEZ (D), Michau (M) kaj Stanienda-HERMASZ (S): (Gratulojn al ĉi lasta pro ŝia edziniĝo)

- 1) ici on entre comme dans un moulin: ĉi tien oni libere eniras, kvazaŭ en butikon (D); neanoncite, senkontrole oni tien eniras (M); ĉi tie oni eniras nur por unu momento, ĉi tie oni eniras kaj tuj eliras (S).
- 2) durcir le ton: pli severe ekparoli (D); iĝi malpli akordiĝema, pli severe rebati (M); malmoligi tonon, severigi parolmanieron (S).
- 3) l' ancien stade a fait toilette: la malnova stadio refreŝiĝis, aspektas pli bela (D); freŝige rebeliĝis la malnova stadiono (M); malnova ejo renoviĝis (S).
- 4) s' en mettre plein la l mppe: plenplenigi sian stomakon (D); manĝi supersate (M); satplenigi sian ventraĉon (S).
- 5) tu n' y couperas pas: vi ne evitos la punon, la servuton (D); vi ja ne eskapos (M); vi ne evitos ĝin, vi ne eskapos (S).
- 6) laisse courir: lasu ilin aĝi (D); preterpasigu, ne konsiderinda (M); lasu forkuri, lasu fari tion, forlasu tion (S).
- 7) se lancer   corps perdu dans une entreprise: plenriske entrepreni (D); senrezerve ĵetiĝi, sindoni en entreprenon (M); ĵeti sin ne singarde en aferon (S).
- 8) lancer   la cantonade: diri por ĉiu, ne al unuopulo (D); disaŭdigeble paroli (M); paroli al nevidebla aŭskultanto (S).
- 9) faire marcher quelqu' un: kaŭzi zorgojn al iu, amuze rakonti falsaĵon al iu (D); ekspluati ies kredemon, trouzi ies fidemon (M); erarigi iun, trompi iun, trompe aktivigi iun (S).
- 10) faire marcher les affaires: ekmovigi la agadojn (D); impulse progresigi negocon (M); ekmovigi aferojn, disvolvi negocojn (S).

Jen la lasta klasifiko por 1984: 1) S-ino MICHAU (26); 2) S-ro DAUCHEZ (18); 3) S-ino STANIENDA-HERMASZ (12); 4) S-ro BOURGOIS (10); ~~5) S-ro DEGOUL (5);~~ 6) S-ro ~~BURSZTA~~ (4).

S-ino MICHAU gajnas premion en valoro de 60 F, S-ro DAUCHEZ en valoro de 40 F kaj S-ino STANIENDA-HERMASZ en valoro de 30 F. Ili rajtas elekti inter kreditkarto kaj libro. Ili skribu al la kasistino pri sia deziro.

ARBARLILIA (daŭrigo)

Tri tagojn Lilia sidis sub neĝa tegmento.

Arbarlilia ne mortinte kuŝis sub la neĝo; ŝi erarperdiĝis, revenante; ŝi ne povis plu iri. Sed estis, apude, areto da abioj. Iliaj branĉoj formis firman tegmenton, sub kiu estis vere seke. Tie sidiĝis Lilia, por ripozi.

Subite venis kelkaj kapreoloj; ili volis sin ŝirmi de la neĝo kaj malvarmo, sub la abioj. La sentivaj bestoj ne timis la knabinon, sed scivoleme ŝin rigardis per siaj grandaj brunaj okuloj. Poste ili ekkuŝis ĉe la knabinon kaj varmigis ŝin. Tiel Lilia pasigis la nokton, kun la kapreoloj. La morgaŭon, la neĝo estis kovrinta la tutan arbaron. Arbarlilia trankvile sidadis en sia verda domo. De tempo al tempo ŝi trinkis iom da lakto el sia kruĉo, kaj ankaŭ trinkiĝis la kapreolojn el siaj kune kavigitaj manoj. Tiel pasis la dua kaj tria tagoj.

Subite la kapreoloj ekflaris. Ili levis la kapon, starigis la orelojn; tiam ili saltis kaj kuris el la abiareto. Tiel la arbetoj malfermiĝis, kaj Lilia vidis virojn alveni. Unuavice paŝis la maljuna Sepp, la amiko de ŝia patro. "Ne eblas!" li ĝojkriis, ekvidinte Lilian, "ŝi estis inter la kapreoloj, sub la abioj!" Triumfe la viroj portis la trovitan knabinon al ŝiaj gepatroj. Kiam Bertoldo aŭdis, ke la kapreoloj savis lian filinon, li ekkriis: "Neniam plu mi pafos al kapreolo!" kaj li tenis sian promeson. (fino)

Laŭ Petro Rosegger

Loka Peranto: S-ro Eloi THIOLLIERE 7, rue Montagny, 42000-St-ETIENNE
Tel. (77) 25 28 24

KONGRESEJO: Villa St-Antoine 27, rue de la Visitation 42000 St-ETIENNE

PROVIZORA PROGRAMO: Vendredon vespere: akcepto

Sabaton matene: prelego "Karitato bazo de la Paco" (P. Bourdon)

posttagmeze: ekskurso tra la urbo
diservo

vespere: debato pri la kongresa temo

Dimanĉon matene: ĝenerala kunveno FKEA
komitatkunveno

posttagmeze: vizito St-Vistor kastelo, preĝejo
St-Rambert preĝejo, etnografia muzeo

Lundon: tuttaga ekskurso al LE PUY-en-VELAY

N.B. Pliaj informoj kaj aliĝilo aperos en la marta bulteno.

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

ESPERANTO EN LA SERVO DE EKUMENISMO (daŭrigo)

En 1894, Tolstoj (ortodoksulo) skribas: "La studado de Esperanto kaj ties disvastigado estas ja kristana afero, kiu helpas la alvenon de la dia regno."

Ekde la komenco de la XX-a jarcento, dum la juna Esperanto-movado ekas, en ĝia sino mem naskiĝas la ekumena tendenco. Ni notu en Pollando la nomojn de M-roj Dombrowsky kaj Zerr; en Franclando, tiun de Markizo de Beaufront, diplomita pri teologio ĉe la Lovena Universitato.

Sed la veraj fondintoj de la esperanta ~~XXXXXXXXXX~~ ekumena movado estas Pastro Peltier kaj Pastoro Paul Hübner. Se ili apartenis al diversaj eklezioj, sama idealo ilin animis.

En 1902, P. Peltier lanĉas alvokon al la katolikoj: "Ĉu ne estas tempo organizi kaj krei revuon? Tiu ĉi, titolita "Espero Katolika", malfermos siajn kolonojn al la samideanoj de aliaj religioj. La organizaĵo disvastiĝas al Anglujo, Belgujo, Hispanujo, Ĉilio, Kanado, Meksiko. Dum la kongreso en Bulonjo, P. Peltier tostas: "Mi esprimas la deziron, ke, per Esperanto, fratiĝu ankaŭ la adeptoj de la diversaj religioj; ĉiuj katolikaj, protestantaj, israelitaj aŭ ortodoksaj pastoroj unuigiu per Esperanto por komune labori por la universala frateco... Ni devas esti la plej fervoraj pioniroj de la universala frateco, ĉar ĝi konsistas je amo al ĉiuj homoj, fratoj en Jesuo-Kristo".

Post la kongreso, li sendas leteron al ĉiuj kristanaj pastoroj: "Ŝajnas al mi, ke la unua paŝo farota estas la reunuigo de la kristanaj religioj. Ĉu ne estas mirige, bedaŭrinde, ke la disĉiploj de Tiu, kies ordo estas "amu unu la alian" daŭre sin malamas reciproke pro disputoj okazintaj antaŭ jarcentoj? Kaj ĉu ne estas necese meti finon al tia stato? Hodiaŭ, en la plej absoluta sincereco, kun koro amoplena, mi faras la unuan paŝon renkonten al vi".

Kaj P. Peltier difinas sian ĉefan celon: unuigi la esperantajn kristanajn pastorojn por starigi la bazon de kunlaborado. Esperanto estos la laborlingvo. (Oni komparis tiun leteron al alia, verkita de Papo Johano XXIII-a en 1963).

La 2-an de junio 1906, Pio X-a aŭdiencas eminentajn katolikajn esperantistojn, kiuj transdonas al li, nome de P. Peltier, dokumentojn pri Esperanto kaj esprimas lian profundan deziron ricevi lian patran benon. Dum la inaŭguro de la Ĝeneva kongreso, P. Peltier ricevas el Vatikano itallingvan leteron: "Bonvolu sciigi al P. Peltier la kontenton de la Papo kaj transdoni al li la apostolan benon, kiun Lia Sankta Moŝto donis al li kaj al la redaktoroj de la revuo". Dum la kongreso, Pastoro Schneeberger, kun la unuanima konsento, legas tiun tekston.

En 1910 - en la jaro mem de la Edimburga Konferenco - P. Richardson fondas en Paris la Internacian Katolikan Unuigon Esperantistan, kies siglo estas I.K.U.E. Siaflanke, Pastoro Hübner, fidela je la doktrinoj de S-ta Paŭlo, havas kiel moton: "Alvenu via regno". Kaj ĝuste "Dia Regno" estas la titolo de la revuo de la Kristana Esperanta Ligo Internacia, fondita en 1911, kies siglo estas K.E.L.I.

JUSTECO EN NIA NunTEMPA MONDO

Tiun gravan temon ni diskutis dum nia lasta kongreso en Blois. Por ke tiu laboro restadu kiel guidilo de la katolikaj francoj, jen la 5 ĉefaj konkludoj:

1. Senco de kelkaj proksimaj vortoj:

- a) Justeco kaj Justico: Esperanto, laŭ la volo de sia aŭtoro, kiu nepre deziris klarecon, difinas per pluraj vortoj la unikan francan "justice". Ni, esperantistoj, tre facile distingas "justeco" = eco de tio, kio (laŭ PIV) estas justa aŭ respektanta egale kaj senpartie la RAJTOJN de la aliaj homoj, kaj haviganta al ĉiu lian apartaĵon, konforme al la interna juĝo de la konscienco, kaj "justico" = ŝtata (aŭ landa aŭ eŭropa aŭ monda) organismo, kiu zorgas pri elekto de juĝistoj kontrolo de ilia agado, plenumo de difinitaj punoj k.t.p. Ni facile konkludas, ke la justico estas servantino de la justeco, kaj devas konstante adaptiĝi al sia esenca rolo, laŭ la ŝanĝoj de la historiaj cirkonstancoj.
- b) Justeco kaj Solidareco: justeco estas koncepto pli larĝa ol solidareco, kiu supozas rilatojn inter individuoj aŭ inter popoloj, sen morala vidpunkto. Tamen ekzistas spirita solidareco, kiun oni nomas "komunio de la sanktuloj" t.e. universala kristana solidareco, en la partopreno en la vivo de Dio.
- c) Justeco kaj Liberiĝo: la liberiĝo postulas la neceson esti justa. Tiu taŭgas por la personoj kaj ankaŭ por la popoloj.
- d) Justeco kaj Paco: la paco estas, laŭ la difino de S-ta Aŭgusteno, "trankvileco en la ordo"; ĝi supozigas justan ordon. Nuntempe, la disvolviĝado de la tria kaj de la kvara mondo estas la vojo al Justeco kaj Paco.

2. Kiaj ĉefaj maljustecoj okazas rilate al familianoj kaj al samlandanoj?

Tro ofte, oni ne respektas la personajn karakterizaĵojn de niaj proksimuloj, ĉu ili estas infanoj, gejunuloj, viroj aŭ virinoj, fortuloj aŭ malavantaĝuloj, laboruloj aŭ senlaboruloj, lertaj aŭ ne, spertaj aŭ ne, artistaj aŭ ne... Oni devas lasi siajn proksimulojn libere vivi laŭ iliaj personaj valoroj ricevitaĵ de Dio, nia komuna Patro, kiu briligas sian sunon super ĉiuj.

3. Kiajn maljustecojn oni ĉefe faras al aliaj popoloj?

Rilate al aliaj popoloj, la maljustecoj devenas de la samaj motivoj kiel por la familioj aŭ la samlandanoj, sed ili estas pli gravaj pro la pli grandaj diferencoj, kiujn oni konstatas inter popoloj pro la ekonomia situacio, la riĉeco de la lando, la valoro de la homoj, k.t.p.

4. Kiajn maljustecojn oni faras al Dio?

Dio donis al ni ĈION: la vivon, materian kaj spiritan, de ĉiuj homoj, laŭ la jarmiloj. Je la servo de la homoj, Dio metis la brutojn kaj la tutan naturon, teran kaj eksterteran. Fine, por ke la homoj iĝu fratoj, Dio la Patro sendis al ili sian propran filon kiel Difraton de ĉiuj sinceraj homoj. Laŭ simpla justeco, la homa respondo al tiel senlima amo povas nur esti tuta kaj sincera dankemo kaj amo. Ni estas maljustaj ĉiufoje, kiam, per nia indiferenteco, nia ekskluziva fido en la homa potenco, ni ne respondas al la Di-amo. Ni petu la helpon de la Spirito de Amo!

5. Kiajn efikajn agadojn ni, katolikaj esperantistoj, povas konduki por kreskigi justecon?

- a) atente legi, kuraĝe praktiki, senĉese disvastigi la "Universalan Deklaracion de la homaj rajtoj".
- b) instrui kaj ĉiel disvastigi Esperanton, efikan rimedon de universala justeco.
- c) defendi la proprajn lingvojn kaj kulturojn de malfortaj popoloj.
- d) lerni kaj respekti ĉian kulturon (v. revuon "Etnismo"), kiam oni prezentas Evangelion.
- e) lukti por ke la registaroj kaj ĉiaj superaj povoj lasu la malsuperajn povojn agi en iliaj apartaj kampoj (ekz. la registaroj devas helpi, ne anstataŭi la familiojn en la edukado de la infanoj, la asociojn en ilia aparta celo...)
- f) respekti la aliajn kristanajn ekleziojn kaj ĉiun valoran religian aŭ eĉ nerelegian sintenon.
- g) partopreni la agadon de ĉiu asocio laboranta sur la kampo de la justeco (Mondcivitanoj, Pax Christi, Amnesty International..)
- h) peti helpon de Kristo, kiu venis surteren realigi ĉian justecon.

ESPERANTO EN RADIO

01.00-02.00	SOROCABA	kHz:1080 m: 278	(12)
06.30-07.00	POLONIA	kHz: <u>7270-6135-5995-1503</u> m: <u>41,27-48,90-50,04-200</u>	(1)
06.40-07.00	KELI	kHz:11835 m:25,35	(11)
06.45-06.57	VIENO	kHz:9770- <u>6155-5945</u> m:30,71-48,74- <u>50,46</u>	(2)
07.00-07.20	VATIKANO	kHz:15120-11715-9755-7250-6250-1611 m:19,84-25,61-30,75-41,38-48,00-186	(3)
10.45-10.57	VIENO	kHz:7170-6155 m:41,84-48,74	(2)
12.00-12.30	POLONIA	kHz:9525-7145 m:31,50-41,99	(1)
12.00-12.30	PEKINO	kHz:9880-7315 m:30,36-41,01	(1)
14.00-14.30	PEKINO	kHz:17745-15165 m:16,91-19,78	(1)
14.00-15.00	R. ESPERANTO	MHz:89,5	(4)
16.30-16.55	POLONIA	kHz:9675-7285 m:31,01-41,18	(1)
17.30-17.55	POLONIA	kHz: <u>7285-6095</u> m: <u>41,18-49,22</u>	(1)
19.00-19.15	BERNO	kHz:9535-6165-3985 m:31,46-48,66-75,28	(5)
19.00-20.00	R. ESPERANTO	MHz:89,5	(6)
20.30-21.00	POLONIA	kHz: <u>7285-6095</u> m:41,18-49,22	(1)
21.00-21.10	VATIKANO	kHz:15120-11700-9645-9625-7250-6250-6190-1530 m:19,84-25,64-31,10-31,17-41,38-48,00-48,47-196	(10)
21.00-21.20	ROMO	kHz:11800-9710- <u>7275</u> m:25,42-30,90- <u>41,24</u>	(7)
21.00-21.30	PEKINO	kHz: <u>9965-9365-7470</u> m: <u>30,11-32,03-40,16</u>	(1)
21.30-21.45	BERNO	kHz:9535-6165- <u>3985</u> m:31,46-48,66- <u>75,28</u>	(5)
22.10-22.30	KELI	kHz:17790 m:16,86	(11)
22.30-22.55	POLONIA	kHz:7285-6095-5995-1503 m:41,18-49,22-50,04-200	(1)
23.00-23.15	RIO DE JANEIRO	kHz:1400 m:214	(8)
23.30-24.00	PEKINO	kHz:11515-9860 m:26,05-30,43	(1)
23.45-24.00	ZAGREBO	kHz:1143 m:262	(9)

1.ĉiutage.2.dimanĉe.3.ĵaŭde.4.merkrede, nur pariza regiono.5.lunde, ĵaŭde, sabate
6.vendrede, nur pariza regiono.7.sabate.8.lunde.9.merkrede.10.dimanĉe.11.la 1-an
mardon.12.lunde. La horoj estas la franca vintra horo. La substrekitaj ondolongoj
kaj frekvencoj estas aŭskulteblaj en Franclando.

Esperantaj radioelsendoj estas (aŭ povus esti) la plej regula kontakto kun
la parola lingvo por la plimultaj esperantistoj. Pasintjare okazis 4220 elsendoj,
kiuj daŭris 1822 horojn. Tio signifas, ke ĉiutage oni povas aŭskulti Esperanton
per radio dum preskaŭ 5 horoj. Konsciu, ke tiuj elsendoj dependas de sia popular-
eco ĉe la aŭskultantoj. SKRIBU AL LA RADIO-STACIOJ:

RIO DE JANEIRO: Brazila Spiritisma Federacio av. Passos 30 BR-20051 RIO DE JAN.
PEKINO: Esperanto-fako Beijing ĈINIO; ZAGREBO: Esperanto-fako YU-41000 ZAGREB
SOROCABA: Radio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio Rua da Penha 455 BR-18100
POLONIA: EsperantoRedakcio Poŝtkesto 46 PL-00950 WARSZAWA; KELI: Radio HCJB/Box
110 S-54201 MARIESTAD; VIENO: O.R.F. Esperanto-fako A-1136 WIEN; VATIKANO: Esper-
anto-fako Piazza Pia 3 I-00193 ROMA; BERNO: Svisa Radio Internacia Esperanto-fako
CH-3000 BERN 15; ROMO: Radio Roma Esperanto C.P. 320 I-00100 ROMA Centro Corr.

12/11/1984: la protokolo de la oktobra komitatkunveno ankoraŭ ne alvenis.
+++++

PRI LA "FACILECO" DE ESPERANTO

"Esperanto estas miraklo de facileco" (M. Boulton), sed nur por ni, fundamentistoj. Estas reala fakto, ke "facileco" estas substanco de Esperanto. En esperantaj vortaroj (pli precize pseŭdoesperantaj, ŝajnesperantaj) oni legas vortojn kiel plakato (afiŝo), daĉisto, lidō, hito, redundanca (E.K. 84), neologismojn, kiuj ruinigas la "facilecon" de Esperanto. Sen substanca facileco eĉ logikeco, Esperanto ne estas pura. Mi estas malamiko de superfluaĵ neologismoj. Esenco de vera Esperanto estas ĝia "mirakla facileco". Esperanto ja evoluadas, sed "facileco" devas resti por ĉiam la esencaĵo de "lingvo internacia", kiu estas "providenca ilo" (Papo Pio X-a).

Eltiraĵo de letero el F. M. (Ĉeĥoslovakujo)

+++++

ENHAVO

- | | |
|-------------------------------|-------------------------------------|
| 1.2. Bileto de la prezidanto | 4. Esperanto-aranĝoj |
| 2. Simpla preĝo | 5. Kongreso en St-Etienne |
| La ĝardenoj en Florenco | Esperanto en la servo de ekumenismo |
| 3. Lingva angulo | 6. Justeco en nia nuntempa mondo |
| Arbarlilia | 7. Esperanto en radio |
| 4. Pilgrimo en Banneux | 8. Pri la "facileco" de Esperanto |
| Biblia semajno en Bad Wimpfen | Kotiztabelo 1985 |

+++++

KOTIZTABLELO

IKUE kun "Espero Katolika" 75 F
Peranto: P. Degrelle c.c.p. NANCY 2 555 38 L.

ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto (individuo)	30 F
Geedza paro	40 F
Infanoj ĝis 16-jaraj, pastroj, religiul(in)oj	15 F
Bonfarantoj	150 F
Dumvivaj membroj	600 F

UFE kun "Revue Française"	170 F
UEA kun "Esperanto" kaj Jarlibro	190 F

Abono al "Biblia Revuo"	50 F
-------------------------	------

Association Catholique Française pour l' Esperanto c.c.p. ROUEN 2324 93 N.

+++++

Dépôt légal: 4ème trimestre 1984	!! Polycopié par l' A. C. F. E.
C.P.P.A.P. n° 62 532.	!! Prieuré St-Martin
Directeur: René-Claude Colas	!! La Houssaye-en-Brie
Directeur-délégué:	!! 77610 FONTENAY TRESIGNY
René-Jean Marmou	!! FRANCE